EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 42>** ● AMO 2022 ● Pola polurigo ● Komunikado ● Francio **< aŭg. 4**

## AMO 88, 89 kaj 90

**AMO 88:** Ni laboras, ke la pezaj registraĵoj pri AMO 88, okazinta en Pollando .estu alireblaj en la kanalo <UEA-viva>. La prelegoj krom mia alvenis en formatoj ampleksiĝantaj 500 kaj 700 MB. Ĝis kiam mi ricevos ion simplan (prefere sur 1 MB) maleblos liveri al vi per EKO la materialon, krom per ligo al retejo.

**AMO 89:** La registraĵoj de AMO-89, kiu okazis kadre de VEKI-3 kaj en la Zomo de la irana asocio, spekteblas en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=D-4xDI73rGM&t=19s.

En EKO 41 ni jam dissendis la prezentaĵon de SMG por AMO 89 pri la 135-jara historio de Esperanto.

La planata AMO-seminario kadre de UK estas nuligita pro manko de reagoj kaj kontribuaĵoj, de monatoj petitaj senrezulte. Sekve okazos renumerigo, legu sube.

## AMO ĝis la jarfino

AMO
Aktivula Maturigo Programo de UEA

Jen la reviziita plano por AMO ĝis la Jarfino.**T** = temo

**AMO 90:** Italio, Brescia, kadre de la itala kongreso. Aŭg 22-27. Kunlabore kun IEF. **T:** 'Sociaj retejoj - kiel starigi kaj prizorgi ilin?' (gvidos Debora Rossetti). Okazos ĉiutage inter 10:30 kaj 12:15 lunde, marde (22-23), ĵaŭde, vendrede (25-26).

**AMO 91:** Togolando, aŭg 29 – 2-a sept, sub prizorgo de ACE. T: Verki kaj eldoni librojn. La komisiono akceptis la proponon, sub la kondiĉo, ke temu pri hibrida seminario; AMO povas aranĝi la retaliron pere de *Zoom* dum unu tago.

**AMO 92:** IKEF. Sept. 25 (dimanĉe). Kun nia komerca faka asocio, plejparte virtuala. IKEF kaj AMO jam bone kunlaboras teme kaj teknologie. **T:** Eŭrazia Ekonomia Komunumo (EEK). En bona ordo.

**AMO 93**. Kubo planas seminarion fine de septembro. Sekvos pli firmaj informoj. Ili havas iom novan estraron kaj revenas al la vivo el la Kovida epidemio.

**AMO 94:** Okt 28-30 en Triesto, Italio. Kunlabore kun ELF-AREK, nia faka asocio pri filatelo kaj kolektistoj. **T:** Arĥivado. M. Beloŝeviĉ (komisionano) partoprenos.

**AMO 95:** Nov. 11-14, Kroatio, **T:** Vortara farado. Kadre de ilia jara ĉiujara aranĝo honore al Lucija Borčić. Espereble hibrida seminario per *Zoom.*

**AMO 96:** Senegalo, decembre, proponata temo: **T**: Interafrika kunlaboro. Preparas kontribuon Burunda Eo-Asocio, sub gvido de la estrarano de UEA pri AMO, Jeremie Sabiyumva.


## Magistriĝo pri Interlingvistiko. Rapidu aliĝi!

En la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), en Poznano, Pollando jam de 1998 funkcias la internaciaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj. Por la studjaro 2022/23 estas planate startigi 2-jarajn surlokajn magistrajn studojn pri interlingvistiko enkadre de la fako Lingvistiko kaj Inform-mastrumado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj) por internacia studentaro.

La dulingva (Esperanta kaj angla) programo inkludas:

- kontinuon de Esperanto kaj la angla en supera nivelo (C1-C2)
- lingvistikon (fonetikon, morfologion, sintakson, semantikon) de Esperanto kaj tra ĝi ĝeneralajn nociojn de lingvistiko kaj lingva tipologio
- internacian kaj interkulturan komunikadon, lingvopolitikon
- analizon de planlingvoj (de filozofiaj tra naturalismaj ĝis artaj lingvoj)
- kulturon kaj literaturon de Esperanto kaj tra tio aliron al mondaj tendencoj
- tradukadon inter la angla kaj Esperanto
- informatikajn ilojn kaj metodojn por lingvistoj (retejoj, korpusoj, tradukiloj ktp).

La informoj en du lingvoj, Esperanto kaj angla:
http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_apr22.html kaj
https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/




***Pripensu aliĝi al la unika programo aŭ transdonu la informon al junulo kiu jam eklernis Esperanton! La stud- kaj viv-kostoj en Pollando estas malpli altaj ol en la okcidentaj landoj. Poznano troviĝas duonvoje inter Berlino kaj Varsovio kun regulaj rapid-trajnoj trafikantaj, eblas ankaŭ alflugi, ofte per nealtkostaj kompanioj***

Aliĝo:
https://rekrutacja.amu.edu.pl/en/studies-cataloge/jezykoznawstwo-i-zarzadzanie-informacja-specjalnosc-interlingwistyka,554

Prof. d-ro hab. Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz; http://interl.amu.edu.pl

## Faka Forumo dum la UK 2022

La Faka Forumo estas programero dum la UK, dum kiu reprezentantoj de Fakaj Asocioj povas prezenti la agadon de sia asocio, proponi kunlaboron, fari sugestojn kaj interkomuniki. Ĝi okazis dum pluraj UK-oj antaŭ la pandemio, kaj virtuale dum la

unua Virtualaj Kongreso kaj inter la du Virtualaj Kongresoj. Por Montrealo estas proponita okazigi ankaŭ ĝin hibride, ĉar plruraj Fakaj Asocioj ne povos sendi reprezentantojn al Montrealo. Por realigi tiun proponon bv. ĝis la komenco de la UK turni vin al la estrarano pri Scienca kaj Faka Agado, Amri Wandel, ĉe amriwandel@gmail.com. Defore vi povos konektiĝi dum la Faka Forumo per Zoom (la ligilon bv. peti de Amri Wandel).

Por prezenti vian agadon dum la Faka Forumo, vi povas prepari mallongan (2-3 minutan) prezentaĵon aŭ vive prezenti ĉeeste aŭ defore per Zoom. La Faka Forumo okazos **lundon, la 8-an de aŭgusto 2022**, je 12:30 EDT (loka tempo) / 16:30 UTC. Aldona ebleco prezenti vian Fakan Organizon kaj agadon al la kongresanoj estas per la Movada Foiro, kiu okazos nur fizike, surloke.

## Francoj bonigas sian kursmaterialon

Esperanto-France eldonis novan version de la materialo Multlingva Akcelilo por franclingvanoj. La unua versio (disponebla ĉe https://lernu.net/instruado/lecionoj) estas anstataŭigita per nova eldono, proponita de Espéranto-France.

Espéranto-France plibonigis la originalan eldonon. Jen la ĉefaj plibonigadoj:

- korektado de eraroj kaj malglataĵoj,
- nova enpaĝigado: anstataŭ printi multegajn foliojn, lernejoj ricevos profesie presitajn dokumentojn,
- aldono de korektitaj ekzercoj.

La materialo enhavas nun:

- por ĉiu lernanto, unu 64-paĝan kajeron, kun ĉiuj tekstoj kaj ekzercoj. Fine de la kajero estis aldonita vortprovizo.
- por la instruisto, unu 84-paĝan gvidilon, kun detala priskribo de ĉiu leciono, prezento de la gramatikaĵoj kaj korektitaj ekzercoj.
- por ĉiu grupo de lernantoj (ĉ. 5 lernantoj), serion de tranĉeblaj kartetoj, presitaj sur dika papero.
- sonojn por ĉiuj tekstoj.

Tiu materialo estas elŝutebla ĉe https://mla.esperanto-france.org/

Instruistoj, kiuj deziros instrui per tiu materialo, povos ricevi ĝin senpage. Ili sendu peton al la komisiono "Instruado", skribante al mla@esperanto-france.org

Informoj de ZPI

## UEA-viva kaj la Kongreso de ILEI

La virtuala kongreso de ILEI sukcese finiĝis. Ĉio estas videbla, spektebla, sur UEA viva en youtube. Jen eta parto: homĉeno. Rigardu ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=bPVxzp1Iw_M

Mirejo

## Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj:

Tiu okazos en la 9-a de aŭgusto. Vidu ĉe:
https://www.un.org/es/observances/indigenous-day/background

- العربيــــة
- 中文
- English
- Français
- Русский
- Español
- (Ĉi tie mankas ĉe UN la Esperanta versio...)




La foto: enkonduka prezentaĵo por la kongresa temo. Ni sendos la tuton per EKO post la UK

Ni devus ekpretiĝi, pretigi materialojn, eventojn por la celebradoj okaze de tiuj 3 tagoj, temoj, jam almenau unu monaton pli frue, ĉar ene de 2 semajnoj okazos la 3 festendaj tagoj!

Tiuj 3 okazoj estas por ni gravaj, ĉar ili estas en rilato kun temoj, al kiuj la lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj.

Kaj je tiuj okazoj ni povas prezenti Esperanton, ĝian eblan helpan rolon en la interpopola komunikado. Por la 9-a de aŭgusto indus reviziti tiujn retpaĝojn, kaj aktualigi, kompletigi, evoluigi ilin:
https://uea.org/vikio/Indi%C4%9Denaj_Popoloj

========= vortoj: 1030 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.